



# la informilo

\*\*\*

## informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

### ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto  
Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F


PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série

trimestriel

4<sup>e</sup> trim. 1981

n° 36



abonnement

un an: 14 F

UNU JARO: 14 F

( 8 INTERN. KUPON. )


## ANTO....FLASH\*ESPERANTO....FLASH\*ESPERANTO

### Le 1<sup>er</sup> CONGRES UNIVERSEL d'ESPERANTO en Amérique du Sud ( BRASILIA = 26/7 - 1/8 1981 ) ...

C'est, en chiffres: 1747 participants de 57 pays dont 932 Brésiliens! En dehors des séances de travail du programme officiel, 13 conférences de niveau universitaire; plus de 20 associations spécialisées en réunion; les salutations de 14 délégués officiels de gouvernements (dont 2 se sont exprimés en espéranto: les ambassadeurs de Pologne et d'Argentine); plus de 10 ambassades accueillant leurs ressortissants; 3000 personnes au service religieux oecuménique; une soirée artistique internationale, une soirée brésilienne, un buffet-banquet monstre, un grand bal mémorable... mais aussi un timbre bilingue émis à 1 500 000 exemplaires, plus de 500 titres d'ouvrages en espéranto offerts aux congressistes (chiffre de vente: près de 140 000 FF!), des excursions inoubliables... et un rendez-vous au prochain congrès universel d'ANVERS, fin juillet 1982!

### AUTRES LIEUX, AUTRES CONGRÈS

- \* Le 37<sup>ème</sup> CONGRES DE LA JEUNESSE MONDIALE ESPERANTISTE a tenu ses assises au Mexique du 10 au 17 juillet à OAXTEPEC.
- \* Le 54<sup>ème</sup> CONGRES DE S.A.T. a eu lieu à BALE du 1<sup>er</sup> au 8 août (300 participants de 16 pays).
- \* La 15<sup>ème</sup> CONFERENCE INTERNATIONALE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES s'est réunie à Gödöllö (Hongrie) du 11 au 21 juillet.



dans ce n° : tout sur

notre  
prochain  
stage

## SUCCÈS DU 18ÈME WEEK-END CULTUREL DE LA LIGUE ESPÉR. SARROISE

C'est en effet plus de 40 participants qui se sont retrouvés à "JUNKERWALD" du 25 au 27 septembre. Venus de France, des Pays-Bas, de Belgique, de Suisse et bien sûr d'Allemagne, les stagiaires ont pu à la fois se perfectionner en E°, assister à une conférence sur E. PRIVAT l'un des pionniers de l'E° de la Fédération Helvétique, à une messe en E° pour les catholiques... et à une soirée de magie particulièrement réussie. Situé dans un magnifique cadre forestier, le Centre Culturel Sarrois, à 2 heures de route de Nancy, mérite la visite de tous les espérantophones de la région Est. Comme se plaisent à le souligner les stagiaires: "On ne peut pas ne pas revenir à Junkerwald!"

## L'ESPÉRANTO DANS L'AUDIO-VISUEL

*Les visiteurs du Centre Culturel Pompidou à PARIS ont à leur disposition, dans le département "Linguistique", un matériel audio-visuel qui leur permet une approche sérieuse de l'espéranto... l'Institut Japonais des Langues quant à lui, propose dans son catalogue spécialisé, des programmes d'étude de l'E° avec films et cassettes, édités par une firme américaine. Par ailleurs, le système de commentaires préenregistrés à la disposition de divers musées ou lieux touristiques se généralise. Le Musée de la Paix et des Victimes de la bombe atomique d'Hiroshima vient d'ajouter des cassettes en espéranto à la série déjà existante pour les autres langues.*

## L'ESPÉRANTO EN AIDE AUX LÉPREUX

Grâce à un timbre émis en allemand et en espéranto, le Docteur Kondor qui enseigne le latin, l'histoire et l'espéranto au lycée Johannes (Laherstein République Fédérale Allemande) a réussi, avec la collaboration de ses élèves, à rassembler une somme de 17 000 DM pour l'aide aux lépreux. Rappelons dans cette optique que des cartes de l'Organisation Mondiale UNICEF sont par ailleurs en vente chaque fin d'année dans différents lieux publics. Celles de 1982 sont déjà disponibles.

## L'ESPÉRANTO A L'ÉCOLE (SUITE!)

*Un compte-rendu très détaillé vient d'être édité par l'Ecole Élémentaire de KAYRO en Italie sur l'expérience d'enseignement de l'espéranto à 154 élèves de cet établissement durant l'année 1981. Déjà dispensé les années précédentes, ce cours de 4 heures hebdomadaires, placées en dehors de l'horaire "officiel" a été fréquenté par 70% de l'effectif. 150 familles ont signé une lettre collective aux autorités compétentes, demandant l'insertion des cours d'E° dans l'horaire normal de l'école. Quelques dizaines d'enfants sont déjà en correspondance avec des garçons et filles d'autres pays, en particulier la Hongrie, la Finlande, une école de New-York et même avec des jeunes Chinois et japonais. Ce document bilingue (italien et espéranto) peut être demandé à l'adresse suivante:*

Scuole Elementare Statale "CEP"  
Settore E° via Flavio Gioja  
09100 CAGLIARI Italia

## UN COSMONAUTE PARLE L'ESPÉRANTO

Il s'agit du Hongrois Bartolan FARKAS qui déclare entre autre: "Je suis persuadé qu'une langue internationale du type espéranto est nécessaire. Celui qui parle plusieurs langues peut reconnaître que l'E° est une langue élaborée avec succès. J'ai été saisi par sa simplicité et la logique de sa structure grammaticale. La finalité de cette langue constitue l'une des pensées humaines les plus grandioses".

## L'ESSOR DE L'ESPÉRANTO EN BULGARIE ET EN NORVÈGE

*Les retombées du Congrès Universel de VARNA (1978) continuent de s'avérer particulièrement fructueuses: 47 journaux et revues dont le quart de diffusion nationale, ont fait paraître 147 articles ou études sur la langue internationale en 1980. Dans le même temps près de 100 émissions radio et 10 émissions télévisées ont été consacrées à l'espéranto.*

*Le Ministère Norvégien des Affaires Extérieures quant à lui, continue la diffusion de documents divers en espéranto. "Les lapons et leur histoire" tel est le titre d'une plaquette récente qu'on peut se procurer auprès de toutes les ambassades (code de référence: UDA 309 / 81 ESP). La Ligue Espérantiste Norvégienne vient d'emménager dans son propre immeuble à OSLO, immeuble acheté grâce aux dons et legs d'espérantistes du pays.*

## L'ESPÉRANTO PAR TÉLÉPHONE!

La ville de Vienne (Autriche) reprend une expérience tentée il y a quelques années aux Etats-Unis: un cours d'espéranto par téléphone à partir du 1er octobre. Un répondeur automatique livre les éléments essentiels de la langue sur simple appel codé du demandeur. L'un des avantages du procédé, en dehors de la permanence de sa disponibilité, réside dans le fait qu'il permet un contact immédiat avec la langue parlée.

## CONNAISSEZ-VOUS L'ARMÉNIE?

*Un ingénieur soviétique va entreprendre un "Tour de France", début novembre. Durant un mois, à l'invitation de différents clubs d'E° il présentera son pays (à l'aide de diapositives et de différents documents) en s'exprimant uniquement en langue internationale, un espérantiste local assurant une traduction simultanée. Kutlukhan SARIKOV sera à BAR-le-DUC le 3 novembre avant de gagner Lyon. Un conférencier australien lui succédera le mois suivant.*

## L'ESPÉRANTO FACE À L'ANGLAIS

Dans sa thèse de doctorat, soutenue le 11 juin 1981, à l'Université d'Amsterdam, Eddy ROS a dédié un important chapitre au thème suivant: "L'espéranto s'avère plus efficace que l'anglais comme langue d'intercommunication dans le domaine des sciences". Cette nouvelle démonstration s'ajoute à celles du Docteur John WELLS (un anglais authentique!) et du Professeur SCHULTZ (ce dernier au cours d'un cycle de conférences au centre de recherches linguistiques de Paderborn (RFA). Il convient de souligner que les deux derniers orateurs ont exposé leur argumentation... en s'exprimant en espéranto!

---

## SESSION DE FORMATION POUR LES PROFESSEURS D'ESPÉRANTO

---

A l'initiative de la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO, des Professeurs et futurs instructeurs de la langue se sont réunis à la même MJC le 4 octobre. Cette première session a rassemblé 29 personnes de la région Est et de villes voisines: citons, outre NANCY, les villes de METZ, COLMAR, BALDERSHEIM, EPINAL, BAR-le-DUC, STRASBOURG, BEAUNE, BESANCON, TROYES, EPERNAY... et MERY-sur-SEINE. Sous la direction de M. Ludwig, professeur de langues, les participants ont pu se familiariser avec les dernières techniques audio-visuelles qui permettent non seulement d'enseigner l'espéranto en un temps record mais également avec un maximum de succès. Cette première session d'études entre dans le cadre de la grande campagne informative 1982, lancée par l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPÉRANTO, dans la perspective d'une prochaine reconnaissance officielle de la langue internationale comme langue à option du programme de second cycle.

---

### LE 14<sup>EME</sup> STAGE D'ESPÉRANTO PARLÉ...

---

... se tiendra à NANCY à la MJC Philippe Desforges, 27 rue de la République. Comme à l'accoutumée, il comprendra 3 cours (initiation et perfectionnement) et 2 cercles de conversation qui permettront aux participants de se perfectionner dans la langue et de se familiariser avec les dernières oeuvres littéraires parues en espéranto: "Les fables de la pie verte" de L. Beaucaire et "Est-il venu du cosmos?" de J. Valano sont les deux ouvrages proposés pour ce stage. Un attrait supplémentaire: "la Ronde Lorraine" -40 exécutants- animera la soirée du samedi. Il convient de rappeler que ce stage permet également à toute personne désireuse de commencer l'étude de l'espéranto, d'acquérir en un week-end une bonne connaissance de base de la langue, toutes possibilités lui étant offertes ensuite d'en poursuivre l'étude (bulletin d'inscription en français et en espéranto dans ce numéro).

---

NB - Ces 4 premières pages de LA INFORMILO (édition normale de 12 à 16 pages) rédigées en français peuvent être utilisées pour information à destination de sympathisants.

---


*Toute personne désireuse d'apprendre l'espéranto  
(ou de se perfectionner) par correspondance peut s'adresser au  
centre spécialisé de notre Fédération:*

ACTIVITES ESPERANTO  
MJC Philippe Desforges  
27, rue de la République, 54000 NANCY

*Ces cours (2 degrés différents) fonctionnent en permanence.*

---

imprimé par l'AGENCE TECHNIQUE DES ASSOCIATIONS, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-le-DUC  
Le rédacteur: Pol DENIS. Le directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT.  
Dépôt légal n° 245. Inscription à la CPPAP sous le n° 62887.



## angulo de l' pensulo

pri tiu rubriko respondecas  
nur la aŭtoroj de la artikoloj.

BEBO PRESKAŬ MORTIS...

Estas la sesa vespere... La telefono sonoras, mi respondas kaj mi aŭdas junvirinan voĉon, kiu, per miksaĵo da nederlandaj, anglaj, francaj vortoj, provas klarigi al mi, ke ŝia bebo estas ĵus transportita al la hospitalo de MARMANDE kaj tie, la ĉeesto de interpretisto estas nepre necesa ĉar la kuracistoj, kompreneble, ne povas paroli nederlande.

Mia edzino -naskita en Nederlando- tuj aliras al la hospitalo kaj trovas la bebon kuŝanta en liteto, kun atentoplenaj kuracistoj kaj flegistinoj. Sed ci-tiuj devas nepre koni kelkajn detalojn antaŭ ol decidi terapion kaj nur la gepatroj kapablas respondi... sed ve!... nur nederlande! La alveno de mia edzino glatigas ĉion kaj kelkajn minutojn poste, komenciĝis la ĝusta terapio, dank' al kiu la 18a-monata bebo hodiaŭ kuras en sia ĝardeno.

Kia ribeliga spektaklo tiuj sindonaj kaj kompetentaj homoj, kiuj iam perdis valoran tempon lernante la latinon kaj aliajn samspecajn futilaĵojn sed kiuj, antaŭ malsanulo, estas senpotencaj pro manko de komuna lingvo!

Depost la jaro 1940, kiam mi eklernis Esperanton, mi aŭdas niajn Ministeriajn Moŝtojn regurdi, ke Esperanto estas sen literaturo, nepre ne povas transiri la pordojn de la lernejoj. Kompatindaj stultuloj! En tia cirkonstanco, kiel ĉi-supre aludite, tute ne temas pri literaturo, sed de homaj kontaktoj; temas eĉ pri la savo de unu aŭ pluraj malsanuloj. Imagu la tragedion, nur el lingva vidpunkto, kiun provokus la disfalo de aŭtobuso de danaj aŭ svedaj turistoj, antaŭ ol trovi danajn aŭ svedajn interpretistojn! Kiom da malfacilaĵoj, kiom da prokrastoj, kiom da perdoj de altvalora tempo!

Francio, ĉiujare, akceptas ĉirkaŭ 10 milionojn da alilandaj turistoj; kion ĝi faras por faciligi iliajn problemojn sur la lingva kampo?... NENION! Niaj lernejoj programoj daŭre plenas je senutilaĵoj kaj Esperanto estas sever malpermesita! La disvolviĝo de la nuntempaj teknikoj kaj la moderna formo de la vivo faras Esperanton unuaklasa socia elemento; sed tion-ĉi ne komprenas niaj malprogresemaĵoj Ministroj de la Nacia Edukado, pli lernintaj ol inteligentaj!

Tamen, ni konservu la firman esperon, ke la nuna Registaro bonvolos plenumi siajn promesojn kaj volos, ke ankaŭ sur tiu kampo, "la aferoj ŝanĝiĝu..." ESTAS URĜE!

A. RIBOT

### SUKCESA KULTURA SEMAJNFINO EN SARLANDO

La 18a kultura semajnfino organizita de Sarlanda Esperanto-Ligo sukcese okazis en Junkerwald de la 25a ĝis 27a de septembro. Partoprenis pli ol 40 personoj el Germanio, Nederlando, Belgio, Svislando kaj Francio. La kurson por komencantoj gvidis Josef Schiffer el Unterkirnach, la kurson B gvidis S-r<sup>o</sup> Kreĵimir Barkovic el Parizo kaj en la kurso C prelegis plej talente S-r<sup>o</sup> Claude Gacond el La Chaux-de-Fonds pri la vivo de E. Privat. Dank' al tiuj prelegoj ni ekkonatiĝis kun la penso de la granda svisa Esperanto-pioniro, kaj ni komprenis, ke la tuta nuna modela agado de niaj svisaj amikoj (kreo de Kultura Centro Esperantista, de CDELI, de Gastejo E. Privat, de feria altlernejo, k.t.p.) fakte estis sugestita de Edmond Privat mem. Okazis krom katolika diservo la infana programo, kiu preparis magiaĵon por la sabato vespere: Ni tiel pli bone konsciis, ke magio estas plej interesa ĉu fare de majstro... ĉu dekomencantoj, kiuj malsukcesas en siaj efektoj, kio ĉiam tre amuzas la publikon!

J.P. COLNOT

Kun granda ĝojo mi partoprenis la Esperanto-Kongreson, kiu okazis je Pentekosto en PERPIGNAN. Mi ne bedaŭris la longan vojaĝon, kiun ni devis veturi por alveni tien. Agrabla estis la restado en tiu ĉarma sudfranca urbo. Multnombraj estis la okazoj renkontiĝi kun la 233 ĉeestantoj en la Palaco de la Kongresoj kaj en la urbo, kie ni povis promeni post la kunvenoj. Eĉ la suno estis brilanta la tutan daŭron de la kongreso.

Ni multe laboris post la oficiala inaŭguro. Okazis ja vere laboremaj kaj viglaj debatoj, kiujn ĉeestis la plej multaj kongresanoj. Gazetoj, loka televido kuniĝis por anonci al la publiko nian renkontiĝon kaj niajn objektivajn. UFE prezentis al ni pres-tiĝan programon "KLUBO 87", preparita agadplano por la venontaj jaroj, ankaŭ diversajn metodojn por kontakti la homojn ("Metodo 4") kaj por instrui ("Metodo 11").

Sinjoro LUDWIG kontribuis, klarigante al atentema aŭdantaro, kiamaniere uzi tiun METODO-N 11. Krom la seriozaj kunvenoj kie do estis aŭditaj novaj ideoj pri la kreskiĝo kaj estonto de la movado, ni ĝuis la bankedon, ekskursojn kaj distrajn vesperojn, kiel rekompenco al bona laboro. Bona etoso regis inter la kongresanoj, kaj en ĉiu angulo de la palaco resonis esperantaj diskutoj.

Ĉio funkciis glate kaj ni devas danki la Prezidanton LLECH-WALTER pro lia peno prepari programon, kiu plezurigis ĉiun. Krome de la oficiala programo okazis prezentado de la teatro "KRIZALIDO", kiu ludis "Ĉu Dio bojas?". Libroservo bone disvendis diversajn librojn. Finfine mi mencias la honorvinon oferitan de la urbestro.

Konklude, bona antaŭenpaŝo por nia movado.

françoise ROUAULT

#### PERKORESPONDA KURSO

Ĝis nun, el 50 gelernantoj aliĝintaj dum la pasinta lernejjaro, nur 3 (menciitaj en la lasta INFORMILO) atingis la kursfinon. Kunlaborantoj bonvolu nun informi nin pri la laboro aŭ relaboro de siaj lerantoj en la lastaj monatoj: ne forgesu, ke mi jam proponas korespondantojn, kiam la lernanto atingas la 12-13an lecionon, kondiĉe ke vi informu min ĝustatempe pri tiu atingo. Laŭ la ĝisnunaj informoj, kiujn mi posedas, nur 3 gelernantoj el 50 do, atingis la kursfinon (6%), dum pasintjare 20 finlernis el 60 (33%).

J.P. COLNOT

#### COURS PAR CORRESPONDANCE ELEMENTAIRE

Deux nouveaux élèves atteignent la fin de ce cours: M. Jean-Claude MANGEOL - 88220 HADOL, dirigé par M. Grossmann et Madame LEPARLIER - 55 ETAIN, dirigée par M. Denis. L'augmentation des tarifs postaux a entraîné automatiquement l'augmentation de la cotisation de notre cours. Les prix du livre de cours et de la cassette n'ont pas changé (merci à SAT-Amikaro!) mais le livre coûte désormais 47F (35F + 12F) et la cotisation proprement dite 48F (dont 16F pour l'abonnement à LA INFORMILO). Toute nouvelle adhésion au cours élémentaire coûte donc 95F (plus éventuellement la cassette 30F).

#### COURS SECOND DEGRE

Pour les élèves terminant le cours élémentaire, nous pouvons encore accepter quelques inscriptions à notre cours de perfectionnement. La cotisation s'élève désormais à 16F, le 1er livre de perfect. ("Por la praktikantoj") 22F plus port 12F. Le 2ème livre ("Paŝoj al plena posedo") 40F plus port 12F (pour les 2 livres commandés ensemble le port est réduit à 15,20f.)

#### COLLECTE D'ARTICLES DE JOURNAUX

Nous cherchons des correspondants pouvant nous fournir les articles sur l'E° paraissant dans les journaux suivants: LE REPUBLICAIN LORRAIN (Metz) - LA LIBERTE DE L'EST (Épinal) - LES DERNIERES NOUVELLES D'ALSACE (Strasbourg).

# 14<sup>ème</sup> stage de l'espéranto parlé

## 14<sup>ª</sup> staĝo de parolata esperanto

7

SABATON 28an kaj DIMANĈON 29an de NOVEMBRO 1981

NANCY

en MJC Philippe Desfotges  
27, rue de la République

NANCY

Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aŭ lernantoj en Orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aŭ vilaĝo, kaj ofte lernantaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en esperanto. La franclingvaj gramatikaj klarigoj estas minimumaj en la kursoj A1 kaj A2, preskaŭ ne ekzistas en la kurso B. En la kurso D ni ekstudas la literaturon de Esperanto.

Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio, veni por praktiki la internacian lingvon.

### ESTOS 5 KURSOJ

KURSO A-1 por tuj komencantoj

KURSO A-2 por ĵus komencintoj, kiuj atingis proksimume la duonon de la unua-grada kurso aŭ partoprenis unu staĝon.

KURSO B por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson: ili simple "babilos" inter si helpe de la libroj menciitaj.


KONVERSACI-RONDO C la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon. (studo de la verko "Fabeloj de la verda pigo")

KONVERSACI-RONDO D studo de la verko "Ĉu li venis trakosme?"

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii la ĉi-suban slipon kaj sendi ĝin (kun antaŭpago de 25 FF por ĉiu persono) kiel eble kiel frue, kaj antaŭ la 14a de novembro 1981, al:

F-in<sup>o</sup> Catherine ROUX, 9 square Aristide Briand, 54500, VANDOEUVRE - tel.: (8) 355 53 36

## ALIGILO



(bonvolu krucumi laŭdezire en la eta kvadrato)

Sr<sup>o</sup>

S-in<sup>o</sup>

F-in<sup>o</sup>

numero de personoj:

(nomo kaj antaŭnomo de la akompanantaj personoj sur aparta papero)

NOMO:

ANTAŬNOMO:

ADRESO:

Tago kaj horo de alveno:

de foriro:

trajne:

aŭtomobile:

Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun lito(j) sabate vespere.

Mi preferas la hotelon kaj rezervas mem

Suplementaj noktoj (eventuale):

Mi rezervas manĝojn sabate vespere por persono(j), dimanĉe tagmeze por persono(j).

Aliaj manĝoj eventuale:

(neniu manĝo dimanĉe vespere en la Junuldomo)

Mi partoprenos en Kurso A1  A2  B  C  D

Ĉu vi abonas LA INFORMILO-N ?:

(Bonvolu noti: Eksterlandanoj prefere ne antaŭpagu)

## programo

SABATON, 28an de novembro - Bonvolu alveni antaŭ la 14a 45, por ke la kursoj povu komenciĝi akurate je la 15a. Jen la laborritmo: kurso (45 minutoj) - ripozo (15 minutoj)... ĝis la 18a45. Tiam funkcios la libroservo. Komuna tagmanĝo je la 19a30.

Je la 20a30 ni ĝuos prezentadon de folkloraj lorenaj dancoj far "LA RONDE LORRAINE", unu el la plej prestiĝaj lorenaj grupoj (40 personoj = dancistoj, muzikistoj, spinetoludantoj).

DIMANĈON, 29an de novembro - matenmanĝo ĝis la 8a30.

- ni laboros de la 8a45 ĝis la 11a45 (samritme kiel sabate)

- libroservo kaj poste tagmanĝo je la 12a30.

- posttagmeze povos okazi diskutoj (proponu temojn), amika

kunestado, urbo- aŭ muzeovizito. Por aktivuloj: komitata kunveno kun partopreno de ĉiuj kunlaborantoj.

### KOSTOJ

-Aliĝkoto: 36F por ĉiu persono (kun la spektaklo). La Federaciaj Membroj, la Abonantoj al LA INFORMILO kaj iliaj familianoj, la gejunuloj 12-18 jaraj pagos nur 20F .  
Senpage sub 12 jaroj.

-Manĝo (tagmeza aŭ vespera): 22F

-Tranoktado kaj matenmanĝo (por unu persono):

\* en unulita ĉambro (rezervitaj por la unuaj aliĝontoj): 38F

\* en du-lita: 33F

\* en 3- 4-lita: 28F

priatentu: tiuj prezoj datumas de septembro. Eta plialtiĝo..ebla!

Se vi preferas tranokti en hotelo = Hotelo Jean Jaurès, 14 Bd Jean Jaurès 54000 NANCY - tel: 327 74 14 Ĉambro 45 ĝis 75F (por 1 aŭ 2 personoj) plus matenmanĝo - Rezervu rekte al la hotelo kun antaŭpago de 50F

*Mi antaŭmendas la jenajn verkojn: Kursoj A1, A2, infanoj "Junulkurso" 24F*

*(Konsilataj por Kurso B) "Por la Praktik." 22F*

*"Paŝoj al plena posedo" 40F*

*(Por konversaci-rondo C)-necesa- "Fabeloj de la verda pigo.." 45F*

*(Por konversaci-rondo D)-necesa- "Ĉu li venis trakosme?" 55F*

*Por ĉiuj (eventuale):*

Mi deziras trapasi ekzamenon... \*atesto pri lernado  \*atesto pri praktika lernado

\*atesto pri kapableco (skriba)

La libroj menditaj estos je via dispono la 28an de novembro. Por la konversaci-rondo C ("Fabeloj de la verda pigo") kaj por la konversaci-rondo D (studo de la verko "Ĉu li venis trakosme?") estas konsilinde havigi al si la ĵus cititan verkon antaŭ la staĝo. Bonvolu ilin mendi al:

LIBRO-SERVO -BP 23- F 54510 TOMBLAINE

Vi ricevos la libron kun la fakturo.



# nia vivo en...

## NANCY

La nova lernjaro komenciĝis per kunveno, en kiu partoprenis 10 personoj, la 24an de septembro. La novaj vesperaj kursoj por komencantoj ne komenciĝos tuj, sed nur en novembro post informaj kampanjoj, kiu estos ĉefe direktita al la studentaro en kaj ĉirkaŭ Nancy. Pere de afiŝoj kaj flugfolioj en 10 studentaj hejmoj (kun entute 4800 litoj) kaj en ses universitataj restoracioj, ni esperas tuŝi la ĉirkaŭ 10 000 studentojn, kiuj vivas en la urbo dum la lernjaro. La informado tamen ne povos okazi antaŭ la 20a de oktobro, kiam preskaŭ ĉiuj studentoj rekomencos sian studadon. Ni planas disdoni 3000 flugfoliojn pri la "Pasportservo", kiujn eldonos la Federacio, kaj 3000 aliajn foliojn pri la lingvo mem kaj pri niaj kursoj en NANCY. Ni jam dankeme ricevis okultrafan modelon por tiu eldono.

Du kursoj funkcios kiel kutime en la Junuldomo Philippe Desforjes, principe je la 20a30 kaj ĵaŭde je la 18a30 ek de la 18a novembro. Alia kurso jam funkcias en la labor-rondo (SAT-rondo) vendrede je la 18a kaj kvara kurso okazos en MJC "Etoile" en VANDOEUVRE, en la proksimeco de pluraj fakultatoj, principe vendrede je la 18a15.

## BAR-le-DUC

La lernjaro estis ja fruktodona! 3 kursoj diversgradaj arigis ĉirkaŭ 30 personojn, kaj kurso komenciĝis malfrue en la liceo, gvidata de S-r<sup>o</sup> THIERY... post kiam li estis asimilinta la "METODO-n 11". Multaj kursanoj ankaŭ ĉeestis niajn staĝojn en NANCY kaj METZ kie kelkaj sukcese trapasis ekzamenojn (listo en la venonta INFORMILO). Nia partopreno en la urba karnavalo ankaŭ fariĝis okultrafa evento; fine de junio 30 homoj de la loka grupo renkontiĝis sur plenaera kampo en apuda vilaĝo proksime de l'urbo por festumi en ĝoja etoso la finon de "l' jaro". Ĉiu ŝate gustumis krad-rostaĵojn, kolbasojn, ekzotikajn salatojn, "eksterordinarajn" kukojn preparitajn de la gepartoprenantoj! Ĉiuj memoros sendube la bongustan kafon, kiun pretiĝis en sia ĝardeno, sub la lumluno, je noktomezo, S-in<sup>o</sup> Lepage en COMBLES-en-BARROIS!

Dum la unua rekunveno de septembro la estraro "reaktualiĝis". De nun sekretarias S-in<sup>o</sup> FRESSE. Elementa kurso enkluziviĝos denove en la kadro de la oficialaj kursoj de la urba ĝemelkomitato, kies sekretario estas S-r<sup>o</sup> Thiéry. Duagrada kurso estas same antaŭvidata kaj eble unu en la Liceo. Tre baldaŭ 800 folioj de la "INFORM-METODO 4" estos disdonataj en ĉiuj publikaj ejoj de la urbo. La 3an de novembro la klubo akceptos S-ron SARIKOV el Sovetunio, kiu publike prelegos pri sia Republika (Armenio).

## A L N I A J L E G A N T O J . . .

Pro ega altiĝo de la pres-papero ni estas devigataj altigi la abon-prezon de nia bulteno, ek de la venonta n<sup>o</sup>. Kiam ni konsideras la nekalkuleblan laboron necesan por prepari nian INFORMILON... ni taksas ja tiun novan prezon (18F) ankoraŭ tre modesta. Ni provos laŭpove havigi al vi ĉiam pli interesan inform-bultenon. Ni kaptas la okazon por peti vian kunlaboradon koncerne la aperendaj artikoloj (NIA VIVO EN, ANGULO DE L' PENSULO, HUMURA PAĜO, ktp)

la redaktoro: P. DENIS

## NASKIĜO \*\*\*\*\*

La 17an de junio naskiĝis eta Flora en la hejmo de nia samideano Jean-François BOUVERON, en NANCY.

La 13an de oktobro nia redaktoro kaj prezidanto P. DENIS ĝojis konatiĝi kun sia tria nepino DOROTHEE. Ankaŭ la avino -kiu redaktas la "distran angulon" de LA INFORMILO - tutsame ĝojis!

Bonvenon al tiuj freŝbakitaj esperantistinetoj kaj gratulojn al la feliĉaj gepatroj kaj geavoj!

# malfermu Esperanto-kurson!

Ne plu estas sekreto, ke grandan parton de la federaciaj membroj ni ŝuldas al la koresponda kurso majstre gvidata de nia samideano J.P. COLNOT. Ankaŭ ni, povas helpi por kreskigi tiun nombron, se ni sukcesas finlernigi la elementan kurson al pli da korespondaj kursanoj. Sed kiel?

Jen propono: vi ja spertas, ke estas malfacile kunvenigi homojn ĉiusemajne por lerni Esperanton dum tuta lernoĵaro. Ankaŭ la instruanto estas tiamaniere devigata de ĵori tre regule. Certe vi aŭdis pri la "METODO 11", kiu prezentas kaj uzigas la ĉefajn gramatikaĵojn kaj vortojn por simpla konversacio. Car estas havebla gvidlibro por instruantoj, en kiu ĈIUJ KURSOJ estas preparitaj, iu ajn parolkapabla esperantisto povas ĝin uzi. Kial do ne reklami por...

- = dusemajna kurso (1 x 2 horoj ĉiutage)
- = aŭ sessemajna kurso (2 x 2 horoj ĉiusemajne)
- = aŭ dekdusemajna kurso (1 x 2 horoj ĉiusemajne)

Post tiaj kursoj la lernantoj kapablus PAROLI!

Sed ne gvidu senpagajn kursojn: pagigu la libron + aliĝon al nia Federacio + abono al LA INFORMILO... do minimume 64F.

Post la fino de la kurso, tiuj, kiuj interesiĝas kaj volas perfektigi, povus enskribiĝi al la perkoresponda kurso (petu aliĝilojn disdonendajn de S-r° COLNOT) por nur 95F. Kaj tiuj certe finlernos. Cetere nenio malhelpas, ke vi aranĝu kunvenojn por kroma aktivigo de la lernitaĵoj.

restas problemo: kie kunvenigi la homojn? Se jam ekzistas Esperanto-Klubo, neniu problemo. Se ne, petu ĉambron ĉe konataj asocioj aŭ eĉ en lernejoj. Kaj kial ne en via hejmo?...

Ĉu ni provu? Ĉi-sube vi malkovros praktikan sciigojn:

Mendoj al - UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS

= kompleta metodo por unu grupo aŭ unu klaso; ĝi entenas  
Ĝi entenas 10 libretojn por la lernantoj  
+ 1 gvidlibron por la instruanto

= 300 F (tiu-ĉi prezo, kiu entenas la sendokostojn ankaŭ  
enhavas unujaran aniĝon -kun la revuo- por 1 se-  
lektota lernanto)

= apartaj vendoj

10 libretoj sen gvidlibro: 205F  
5 " " : 135F  
1 libreto sen gvidlibro : 30F

1 gvidlibro por la instruanto: 35F  
5 libretoj + 1 gvidlibro: 165F  
3 libretoj + 1 gvidlibro: 110F

E. LEDWIG

notenda!

**1982: nia FEDERACIA KONGRESO**

**okazos en Kulturcentro A.WALLACH en**

**RIEDIESHEIM**

**3an/4an de aprilo**



## KELKAJ ATENTINDAJ KOMUNIKOJ





L'un des grands voyages de votre vie! AVEC L'AIDE DES ESPERANTISTES CHINOIS, un séjour en Chine du 15 août au 4 septembre 1982 (départ de et retour à LONDRES).

Tous renseignements et programme détaillé auprès de:

(Joindre enveloppe timbrée pour réponse)

M. P. DENIS  
5, chemin de Blamecourt  
55000 BAR LE DUC  
Tél. (29) 79 01 44



Familio CLAUDEL komunikas:

"Ĉu vi konas la landon, kie floras la oranĝarboj?... Se ne, vi nepre veturu al la ESPERANTO-OAZO kuŝanta en hispanio, apud GANDIA, 65 kilometrojn sude de VALENCIA. Tie, meze de senfinaj oranĝejoj, vi trovos kaj ĝuos kvietan terenon por loki vian tendon aŭ vian karavanon, komfortajn tualetejojn kun akvo varmigita de la suno, kahelitan naĝejon (12m x 7m) kun varma akvo (28°/30°C.). Vi ankaŭ povos veturi al la fama plaĝo de GANDIA, je 10 km for de la "oazo", unu el la plej bonaj hispanaj plaĝoj, kun tre fajna sablo.

La vetero estas belega, sed vi ne suferos de la varmo, ĉar ofte blovas venteto. La samideano, kiu aĉetis la terenon kaj konstruigis la instalaĵojn tre afable kondukis al ni dum nia trisemajna restado kaj li estus tre feliĉa respondi al viaj demandoj kaj akcepti vin en sia kampadejo rezervita por esperantistoj.

